



S-ro EMANUELO MONTEAGUDO  
Sekretario de la Grupo Esperantista de Coruña.

# LA SUNO HISPANA \*

---

**ENHAVO:** 1. Gratulo.—2. Nia literatura felietono.—3. Senpatrina infano (poezio).—4. Malnovaj rakontoj.—5. Rakonto.—6. Sciigoj.—7. Bibliografio.—8. Miksaĵoj.—9. Novaj anoj.—10. Korespondada fako.—11. Niaj vizitantoj.—12. Anoncoj.

---

## Gratulo

S-ro Ricardo Codorniu, la respektinda Prezidanto de Hispana Societo, ricevis de D-ro Zamenhof la jenan leteron:

«Varsovio 2-6-06.

Kara Sinjoro!

Okaze de la edziĝo de La Reĝa Moŝto mi sendas al la Hispana Societo Esperantista mian koran gratulon. Vivu la Gereĝoj! por la bono kaj feliĉo de via lando.

Via

Zamenhof.»

La gratulo de nia karega Majstro, gratulo montranta unu fojon pli lian ĝentilecon kaj fratecon, estas akceptita kun ĝojo kaj danko de la hispana samideanaro.

## Nia literatura felietono

En la nuna numero de SUNO HISPANA ni finas la publikigon de la Moratin'a verko *La kuracisto per battoj*, lerte tradukita de nia samlandano S-ro Vicente Inglada.

Ĉar tiu unua felietona verko atingis bonan sukceson kaj estis aplaŭde akceptita de nia legantaro, ni daŭrigos la publikigon de verkoj aparte bindeblaj. Tial, do, en la proksima numero ni komencos enpresi tradukon de alia Moratina verko:

### LA JESO DE LA KNABINOJ

(EL SÍ DE LAS NIÑAS)

faritan de la Prezidanto de la Murcia Grupo, S-ro Norman Maclean, kaj post ĝi aperos tradukoj de nuntempaj hispanaj verkoj kaj ni jam povas anonci la publikigon de *La Ombro*, novelo de la famkonata verkisto Pérez Galdós, kiu kompleze donis al S-ro Duyos permeson por la tradukado.

Nia celo estas liveri al nia legantaro hispanliteran Bibliotekon tradukitan esperanten.

Kaj ni esperas sukcese atingi nian celon.

## Senpatrina infano

Sur la varma beleta lulilo  
Infanet' sin agitas ploranta,  
Kaj manetojn etendas peteme,  
Patrinon serĉanta.

Estas vane, ke ĝi helpkriadas  
Atendante kareson de iu,  
Ĝia ploro perdiĝas ekteren  
Kaj venas neniŭ.

Kiel povas patrino restadi  
For de ĝi, dum suferas fileto?  
Ĉu ŝi povas alvokon malŝati  
De bela knabeto?

Tute ne, tute ne, bedaŭrinde,  
Jen ĵus mortis patrin' senkonsola,  
Kaj restigis la amatan fileton  
Senhelpa, tutsola...

V. INGLADA.



## Malnovaj rakontoj

En malgranda vilaĝo de la kastila lando loĝis antaŭ longe pastro, kiu ne sole plenumis fervore siajn apostolajn devojn sed plie la gastaman devigon, tiel bone kiel li povis fari ĝin per siaj malsufiĉaj gajnoj.

Iam, okazinte la oportunaĵo sidi ĉe sian tablomanĝon amiko, kiu meritis grandan ĝentilecon, li rimarkis kun vera surprizo, ni dirus pli bone, eĉ kun grandega miro, la mankon de unu piedego ĉe la grasa kokino zorge elektita el la neplena kokinejo, kaj poste lerte preparita de la kuiristino por regali la gaston.

En tiama momento li silentiĝis diskrete, sed ĝustatempe, rimarkigis al la bona virino la neaŭditan okazon, kaj kondamnis la malbonaĵon tiel solene kiel la okaza graveco ĝin postulis.

—Sinjoro, ekkriis la ruza virino, la kokinoj de tiu ĉi vilaĝo havas nur unu piedegon; venu kun mi, sinjoro, vi vidos ĝin; tiel vi konvinkiĝos plene,

Je la dorma horo li kaj la servistino eniris en la kokinejon, kaj vidis efektive la strangajn birdojn unupiede starantajn laŭ la servistino diris al li.

Antaŭ la okazo, la pastro restis unue surpriza, poste mireza, sed pasinte sia miro, li agitis la nigran mantelon kaj timigis la birdaron kiu forflugis ĉiufanken, montrante al vizitantoj la kaŝitajn piedegojn.

—Ĉu vi vidas—kriegis kolere la pastro al la maljuna servistino, batante la plankon per granda piedfrapo—kiel la ĉitieaj kokinoj kutimas eltiri siajn piedojn tiam kiam estas necese?

—Nu! rediris la maljunulino, kial vi ne skuis vian mantelon kiam mi metis sur tablotukon la rostitan kokinon?

EDUARDO CANO, *esperantigis*.

---

## Rakonto

(Kion mi aŭskultis antaŭ malmultaj tagoj)

Geedzaj estas tre batalemaj, kaj kiam ili atingas la plej altan gradon el sia kolero, ambaŭ rulas la meblojn, kaj eĉ ilin forĵetas tra la balkono sur la straton.

Jam, altirita de la batalbruado, venis kuzo de la geedzaj por ilin pacigi; kaj ĉe la strata pordo, li renkontis najbaron starantan antaŭ la domo, kaj atente rigardantan la balkonon.

—Kion vi faras tie ĉi? demandis la kuzo malafable. Vi estas tro scivolema pri aferoj neinteresaj por vi. Miaj kuzoj batalas, kiel kaj kiam ili volas batali!

—Aŭskultu, sinjoro; respondis la demandito, ĉio estas klarigebla: mi staras tie ĉi, ĉar kiam viaj gekuzoj ekbatalas, oni aŭdas konfuzan bruadon kaj fortajn batojn de tempo al tempo; poste, ia ajn stratiranto, povas vidi, de iom post iom, eliras tra tiu balkono, kaj elfalas straten, kelkaj mebloj. Nu, kiel mi estas malriĉulo, mi devos eltiri profiton el ĉio; tial, tuj kiam la mebloj ektuŝas teron, mi ilin prenas kaj portas

en mian hejmon. Do, tial ke vi estas parenci de la batalantoj, vi povas prunti al mi bonan s'ervon, dirante al ili, ke mi staras tie ĉi jam de longe; ke ili baldaŭ kiel eble, forĵetu la meblojn definitajn por la forĵetado, ĉar mi havas multajn kaj premegantajn aferojn farotajn kaj ne povas resti tie ĉi multe da tempo.

*Esperanten tradukis A. L. VILLANUEVA.*



## Sciigoj

**Anglujo.**—D-ro Lloyd faris konvinkan paroladon ĉe la Scienca Akademio de Glasgow kun grandega sukceso.

Alian gravan sciigon ni ricevis el tiu nacio. La Internacia Kongreso de Komercaj komizoj akceptis Esperanton, kiel oficialan lingvon por estontaj internaciaj rilatoj de la membroj de la internacia federacio.

**Germanujo.**—Fondiĝis grupoj en Megseburg.

La Hamburga Komerca Akademio faris dum la pasinta vintro kurson de Esperanto oficiale akceptante nian lingvon. La sukceso atingita certe kuraĝigos tiun korporacion por daŭrigi ĝian instruadon.

**Bohemujo.**—La klopodoj de niaj bohemiaj samideanoj atingas bonan sukceson. Ĝus fondiĝis grupoj en Prosek kaj en C. Budejovice.

**Italujo.**—Ni salutas la aperon de nova kolego en Palermo, kies unua numero respondas al monato Junio. La nova revuo esperantista «Idealo» estos ĉiumonata kaj estas akceptita kiel organo de «Sicilia Federacio Esperanta» kaj de la internacia societo «La Tasko».

Sendu abonojn (vidu la fakon *Niaj vizitantoj*) rekte al ĝia direktoro: doktoro Vitangelo Nalli, Corso Calatafimi, 495, Palermo.

**Inglaterra.**—En la Academia de Ciencias de Glasgow dió el Sr. Lloyd una convincente conferencia con grandísimo éxito.

Otra importante noticia recibimos de esa nación. El Congreso internacional de comisionistas comerciales aceptó el Esperanto como lengua oficial para futuras relaciones internacionales entre los miembros de la Federación internacional.

**Alemania.**—Se fundaron grupos en Magdeburg y en Merseburg.

La Academia Comercial de Hamburgo hizo un curso de Esperanto durante el pasado invierno. El éxito alcanzado animará ciertamente á dicha corporación para continuar su enseñanza.

**Bohemia.**—Los trabajos de nuestros correligionarios bohemios alcanzan buen éxito. Acaban de fundarse grupos en Prosek y en C. Budejovice.

**Italia.**—Saludamos la aparición de un nuevo colega en Palermo, cuyo primer número correponde al mes de Junio. La nueva revista esperantista «Idealo» será mensual y ha sido aceptada como órgano de «Sicilia Federacio Esperanta» y de la sociedad internacional «La Tasko».

Envíense los abonos (véase la sección *Niaj vizitantoj*) directamente á su director: Dr. Vitangelo Nalli, Corso Calatafimi, 495, Palermo.



Ni deziras al nia nova itala kolego longan kaj sukcesplenan vivadon.

**Franujo.**—Oni rajte povas diri, ke ne pasas monato ne alportante gravan ekpuŝon al nia afero en nian najbaran Respublikon.

S-ro Farjon, la konata fabrikisto de la plumo «Esperanto» estis elektita deputato la 20<sup>an</sup> de Majo. Li estas de longatempe varma esperantisto; li multe helpis por la formado de la Grupo de Boulogne-sur-Mer kaj alportis al ĝi la patroncon de la tiea Komerca Ĉambro, kies prezidanto li estas. Je la nomo de tiu grava Ĉambro li akceptadis oficiale la kongresistojn kaj paroladis esperante kun granda sukceso.

«La France du Nord» empresas leteron de S-ro Farjon promesante apogi varmege en la Deputata Ĉambro la proponon de S-ro Cornet, por ke Esperanto estu oficiale enkondukata en la programojn de ekzamenoj. Pro sia kompetenteco pri komercistaj kaj instruistaj aferoj, S-ro Tarjon povas multe fari por nia afero.

Laŭ privata letero de leŭtenanto Bayol, la konata kaj senlace propagandisto de Esperanto en la franca armeo, li esperplene laboras por ke Esperanto estu akceptata de la internacia institucio «La Ruĝa Kruco». Lia verko *Esperanto kaj Ruĝa Kruco* aperonta la 1<sup>an</sup> de Aŭgusto, estas dediĉita al S-ro Moynier, prezidanto de la Internacia Komitato de Ruĝa Kruco en Genevo, kiu plezure akceptis ĝin. Esperanto, do, havas simpatian de la granda majstro de tiu bonfara institucio. Tiu Internacia Komitato ricevis multajn skribaĵojn pri Esperanto kaj tre kredible la lingvo internacia estos diskutata en la proksima Konferenco internacia de la Ruĝa Kruco, kiu okazos en Londono en 1907.

Estas tre bela koincido, ke en Genevo, la sidejo, por tiel ĝin diri, de la Kruco Ruĝa okazos la Kongreso Esperantista de 1906, kaj en Londono, urbo hodiaŭ

Deseamos á nuestro nnevo colega italiano larga y próspera vida.

**Francia.**—Bien puede decirse que no pasa mes sin traer gran adelanto para nuestro asunto en nuestra vecina República.

El Sr. Farjon, conocido fabricante de la pluma «Esperanto» fué elegido diputado el 20 de Mayo. Es ferviente esperantista de nuestro tiempo; ayudó muchísimo á la formación del Grupo de Boulogne-sur-Mer y le llevó el patronato de aquella Cámara de Comercio, cuyo presidente es. En nombre de dicha importante Cámara recibió oficialmente á los congresistas y habló con gran éxito en Esperanto.

«La France du Nord» inserta una carta del Sr. Farjon prometiéndole apoyar calurosamente en la Cámara de los diputados la proposición del Sr. Cornet, para que el Esperanto sea oficialmente introducido en los programas de exámenes. Por su competencia en asuntos comerciales y de instrucción, el Sr. Farjon puede hacer mucho en favor de nuestro asunto.

Según carta particular del teniente Bayol, conocido é incansable propagandista del Esperanto en el ejército francés, trabaja con esperanza de éxito para que el Esperanto sea aceptado por la institución internacional la Cruz Roja. Su obra, *El Esperanto y la Cruz Roja*, que aparecerá el 1.º de Agosto, está dedicado al Sr. Moynier, presidente del Comité internacional de la Cruz Roja en Ginebra, que la ha aceptado con placer. El Esperanto, pues, tiene las simpatías de la primera autoridad de esa benéfica institución. Dicho Comité internacional ha recibido muchos escritos sobre el Esperanto, y probablemente la lengua internacional será discutida en la próxima conferencia internacional de la Cruz Roja que se celebrará en Londres en 1907.

Hermosa coincidencia es que en Ginebra, la residencia, por decirlo así, de la Cruz Roja, se celebre el Congreso esperantista de 1906, y en Londres, ciudad



tiel favora al nia lingvo, la Konferenco de la Ruĝa Kruco de 1907.

Jen la letero-antaŭparolo, kiun por la verko de S-ro Bayol, sendis D-ro Zamenhof:

«Al Sinjoro Leŭtenanto Bayol, instruisto ĉe la Speciala Militista Lernejo, en Saint-Cyr.

»Kara Sinjoro:

»Vian laboradon por la akcepto de Esperanto ĉe la Ruĝa Kruco mi trovas tre grava kaj mi deziras al vi la plej bonan sukceson.

»La Ruĝa Kruco apartenas el tiuj institucioj, kiuj la plej multe bezonas ian facile ellerneblan komunan lingvon; ĉar se aliaj institucioj nur iafoje havas aferojn kun malsamlingvuloj kaj lasas la eblon serĉi tradukanton, la Ruĝa Kruco preskaŭ ĉiam koncernas alilingvulojn kaj postulas komprenigadon tujan. La noblaj laboroj de la Ruĝa Kruco sur la kampo de batalo ofte perdas ĉian valoron nur pro tio, ke la savanto kaj la savato sin reciproke ne komprenas.

»Se vi sukcesos iam atingi la interkonsenton de la registaroj, ke ĉiu soldato ironte en la militon lernu la plej gravajn vortojn de lingvo internacia, tiam vi povos diri, ke vi forprenis de la militoj grandan parton de ilia krueleco, kaj vi donis al la Ruĝa Kruco ĝian efektivan valoron.

»Via

»L. ZAMENHOF.»

La grava verko de S-ro Bayol estos tradukita en multajn lingvojn. La hispana traduko estos farita de nia fervora samideano kapitano Duyos.

**Hispanujo.** — S-ro Alicia Caravaca, delegito de la Provinca Komisiono de la Ruĝa Kruco en Valencio, kaj la Ĉefa Inspektoro S-ro Ferdinando Ibáñez kaj la oficiroj de la Valenciana Brigado tutkore gratulas S-ron Bayol pri liaj klopodoj favoraj al Ruĝa Kruco kaj oferas al li

hoy tan partidaria de nuestra lengua, la conferencia de la Cruz Roja de 1907.

He aquí la carta-prólogo que, para la obra del Sr. Bayol, envió el Dr. Zamenhof:

«Al señor teniente Bayol, profesor en la Escuela Especial Militar de Saint-Cyr.

»Querido señor:

»Sus trabajos para la aceptación del Esperanto en la Cruz Roja los juzgo importantísimos y les deseo el mejor éxito.

»La Cruz Roja pertenece á esas instituciones que necesitan muchísimo una lengua común que se aprenda fácilmente; porque si otras instituciones sólo alguna vez tienen asuntos con personas de diferente idioma y dejan la posibilidad de buscar traductor, la Cruz Roja casi siempre relaciona personas de diversas lenguas y exige una inteligencia inmediata. Los nobles trabajos de la Cruz Roja sobre el campo de batalla pierden frecuentemente todo su valor sólo porque el salvador y el salvado no se entienden.

»Si usted consigue algún día alcanzar el consentimiento de los gobiernos para que todo soldado que vaya á campaña aprenda las más importantes palabras de una lengua internacional, podía decir entonces que quitó usted á las guerras gran parte de su crueldad y dió á la Cruz Roja su efectivo valor.

»Vuestro

»L. ZAMENHOF.»

La importante obra del Sr. Bayol será traducida á muchas lenguas. La traducción española será hecha por nuestro fervoroso correligionario capitán Duyos.

**España.** — D. Alicia Caravaca, delegada de la Comisión provincial de la Cruz Roja en Valencia, y el jefe inspector don Fernando Ibáñez y los oficiales de la brigada de Valencia, felicitan cordialmente al Sr. Bayol por sus trabajos en pro de la Cruz Roja, y le ofrecen su cooperación



sian kunhelpon en la disvastigado de Esperanto inter la membroj de tiu belega tutmonda Instituto.

Jen la nomaro de artikoloj publikigitaj de hispanaj ĵurnaloj por aŭ kontraŭ Esperanto.

En la Murciaj ĵurnaloj «La Verdad» kaj «El Liberal», S-ro Ricardo Codorniu publikigis konvinkajn artikolojn titolitajn «Esperanto kiel progresilo» kaj «Esperantista Kongreso en Genevo».

«La Correspondencia de España» enpresis bonegan anoniman artikolon sub la titolo «Universala Lingvo».

Alla titolita «Esperanto kaj la Katolikoj» aperis en «El Universo» subskribita de S-ro Bravo del Barrio.

«Museo-Exposición» de Alicante publikigis poezion «Al harpo» de nia karega amiko V. Inglada, poezion jam konatan de niaj legantoj.

S-ro Salvador Padilla verkis por «El Eco de Orense» hispanan tradukon de «La kampo de la morto».

Ankaŭ en «El Correo» de Valencia publikigis hispana traduko de «Du herbejoj» de Sienkievitz subskribita de nia simpatia amiko S-ro Francisco Domingo.

En la sama ĵurnalo valencia S-ro Duyos publikigis artikolon sub la titolo «Ni jam venkas».

Kaj nia fervorega propagandisto sinjoro Roman Ayza daŭrigas sian sukcesplenan artikolan prezentante nian helpan lingvon al la legantoj de «La Correspondencia de Valencia».

Subskribita de S-ro Alvar Fáñez, aperis en la «Lectura Dominical» artikolo kontraŭ Esperanto, kiu nur pruvas la nesciecon de la aŭtoro en la pritraktata afero.

Fine, nia karega amiko kaj entuzisma esperantisto S-ro Celestino Escobés, el Calahorra, enpresis belegan kaj dikan artikolon pri Esperanto en la gazeto «La Opinión» kiu eldoniĝas en tiu sama urbo Calahorra.

En la Pedagogia Konkurso baldaŭ okazonta en Santiago (Galicia) estas defi-

en la propagación del Esperanto entre los miembros de esta hermosísima institución universal.

He aquí la lista de los artículos publicados en periódicos españoles por ó contra el Esperanto.

En los periódicos de Murcia «La Verdad» y «El Liberal», D. Ricardo Codorniu publicó convincentes artículos titulados «El Esperanto como instrumento de progreso» y «Congreso esperantista de Ginebra».

«La Correspondencia de España» insertó un excelente artículo anónimo bajo el título «Lengua universal».

Otro, titulado «El Esperanto y los católicos», apareció en «El Universo», firmado por el Sr. Bravo del Barrio.

«Museo-Exposición», de Alicante, publicó la poesía «Al harpo» de nuestro querido amigo V. Inglada, poesía ya conocida de nuestros lectores.

D. Salvador Padilla escribió para «El Eco de Orense» una traducción española de «La kampo de la morto».

También en «El Correo» de Valencia se publicó la traducción española de «Du herbejoj», de Sienkievitz, firmada por nuestro simpático amigo D. Francisco Domingo.

En el mismo periódico valenciano, el Sr. Duyos publicó un artículo con el título «Ya vencemos».

Y nuestro fervoroso propagandista D. Román Ayza continúa con muchísimo éxito sus artículos presentando nuestra lengua auxiliar á los lectores de «La Correspondencia de Valencia».

Firmado por un Sr. Alvar Fáñez apareció en «La Lectura Dominical» un artículo contra el Esperanto.

Finalmente, nuestro querido amigo y entusiasta esperantista D. Celestino Escobés, de Calahorra, ha publicado un hermosísimo y nutrido artículo sobre Esperanto en el periódico «La Opinión», que ve la luz en aquella misma ciudad de Calahorra.

En el Certámen pedagógico que se celebrará pronto en Santiago (Galicia), se

nita temo por Esperanto. Hispana Societo p. p. Esperanto donacas tri bonegajn esperantajn verkojn al la premiota temo. Ĉar la konkurso estos eble prezidata de la eksurbestro S-ro Garcia Prieto kaj deputato S-ro Montero Villelgas, ni esperas ke la temo pri Esperanto faros utilan propagandon en la nord-okcidentaj hispanaj provincoj.

Multe da entuziasmo estas en Villagarcía, kie eble la nova kaj fervora esperantisto S-ro Padilla, profesoro de la «Instituto de Orense», faros propagandan paroladon.

Ni ankaŭ esperas, ke aŭtaŭ ol finiĝos la jaro, fondiĝos grupo en Ferrol.

ha signalado un tema para el Esperanto. La Hispana Societo p. p. Esperanto regala tres excelentes obras esperantas al tema premiado. Como el Certámen será probablemente presidido por el ex alcalde de Madrid Sr. Vincenti, y asistirán también el ex ministro Sr. García Prieto y el diputado Sr. Montero Villelgas, esperamos que el tema sobre el Esperanto hará utilísima propaganda en las provincias del noroeste de España.

Mucho entusiasmo en Villagarcía, donde probablemente dará una conferencia de propaganda el nuevo y entusiasta esperantista Sr. Padilla, catedrático del Instituto de Orense.

También esperamos que antes de terminarse el año se fundará un grupo en Ferrol.

---

## Bibliografio

*Vocabulario Italiano-Esperanto*, verkita de profesoro Luigi Giambene, 198, Babuino.—Roma. Prezo, 1,25 liro.

Tiu ĉi estas la unua vortaro por italoj kaj vere la verketo estas tre utila. Ĝi enhavas, mallonge kiarigitajn, la gramatikajn regulojn, tabelon de prefiksoj kaj sufiksoj kaj klarigon pri la kunmetado de vortoj. La vortaro enhavas proksimume 5.000 vortojn; ĝin sekvas vortareto de geografiaj nomoj, uzebla frazaro, «La Espero» kaj la regularo de la «Roma Esperantista Societo».

Ni gratulas S-ron Luigi Giamene kaj deziras al lia verko bonan sukceson, tiel bonan kiel ĝi meritas.

*Plena Verkaro* (libro dua) de V. N. Devjatin.—Presejo de P. Wejsbrut, 14, Troickij Prospekt, St. Petersburgo, Ruslando.

Tiu interesplena verko enhavas: 1. *Edziĝo*, komedio en tri aktoj. 2. *Arturo*, rakonto. 3. *Ludilo de Sorto*, rakonto en versoj. 4. *Episkopo*, drama skizo en versoj. 5. *Poltavo*, poemo de A. Puŝkin verse tradukita.

La nomo de la aŭtoro permesas al ni ne starigi laŭdon por ke niaj literaturamantoj aĉetu la verkon. Ili tion faros kaj lutanime ĝin ŝatos. La libro (144 paĝa) nur kostas 1 rublo 55 kopekoj.

*Le 1<sup>er</sup> Congrès Espérantiste à Boulogne-sur-Mer*. Extrait des Annales de la Société Académique, de D-ro Saquet.—Sen montrero de prezo.

Tiu ĉi broŝureto france verkita tre bone taŭgas por la propagando en franclin-



gvaj landoj. Kiel montras sia titolo, ĝi enhavas mallongan raporton pri la sukcesoj de Bulonjo.

Ni sendas nian tutkoran dankon al la aŭtoro pri la ricevita ekzemplero.

*Kvarvoĉaj Kantoj* por Esperantistoj.—Kant-verko enhavanta ses mallongajn kantoj: 1. Anĝelo. 2. Kanto de l'ligo. 3. La malliberulo. 4. Al la reĝo. 5. Sonoriloj de vespero. 6. La Espero; ĉiuj el la «Fundamenta Krestomatio», muzikverkitaj de S-ro A. Trickett.

Kiel nuran komenton pri tiuj beletaj kantoj ni kopias tie ĉi la plenumindan ideon esprimatan de nia amiko S-ro Coox en la gazeto «La Belga Sonorilo»:

«Kiel montras la titolo, la kantoj estas komponitaj por kvar voĉoj. Tion vidante, ni demandis nin: ĉu ne estus eble organizi internacian ĥor-kantistaron ĉe la Geneva Kongreso? Jen estas la plano tuj elpensita.»

«Ĉar la kantoj supre montrataj estas tre mallongaj, prezentas nenian teknikan malfacilaĵon kaj estas, sekve, tre facile elerneblaj. ni proponas ke ĉiu esperantisto aĉetu la libreton (almenaŭ se li intencas ĉeesti la Kongreson kaj posedas iomete da kant-kapablo) kaj lernu, el ĉiu kanteto, la parton, kiu rilatas lian voĉon. Plie, ĉiu esperantista grupo instruu la ses kantojn al siaj muzikamantoj; tiamaniere, se kelkaj el tiuj ĉi irus Genevon, ili estos jam spertaj pri la afero. Se ĉiu amiko muzik-amanto, bonvolos efektiviĝi tiun planon ni certe sukcesus kunigi kelkajn 1<sup>ajn</sup> tenorojn el du aŭ tri nacioj, ekz. landoj A. B. C.; la 2<sup>ajn</sup> tenorojn el landoj D. E. F.; la 1<sup>ajn</sup> basojn el landoj G. H. I., kaj la 2<sup>ajn</sup> basojn el landoj J. K. L.»

«Ankaŭ neordinara afero estus ke la ĥorestro tute ne konu iun ajn el siajn direktotajn kantojn, kaj ke li vidu ilin unufoje nur la tagon aŭ la antaŭan tagon de l'koncerto.»

«Se oni deziras pliajn detalojn, oni skribu rekte al redaktoro de «La Belga Sonorilo» en Duffel.»

La verketo *Kvarvoĉaj Kantoj*, eldonita de la «Brita Esperantista Asocio» kostas fr. 0,60; tamen la unuajn mendojn estos liverataj po fr. 0,30, transporta kosto plie.

*Detala raporto pri la oficialaj paroladoj, diskutadoj kaj decidoj de la Unua Universala Kongreso en Bulonjo-sur-Maro*, laŭ stenografiaj notoj verkita de Fr. Schneeberger.—Oficejo de Esperanto kaj Stenografio.—Laŭfont (Svisujo). Prezo fr. 1,30.

Estas ĉe ni tre konata la agema Pastro Schneeberger precipe pro siaj laboroj pri esperanta stenografio kaj la mirinda verko, kies aperon ni anoncas al nia legantaro, estas la plej efika pruvo montranta la sukceson atingitan de la aŭtoro en la alfarado de la sistemo Stolze-Schrey al la helpa internacia lingvo.

Fiksinte la parolojn de la esperantistoj el la plej diversaj nacioj en la Bulonja Kongreso, Pastro Schneeberger prezentas en tiu ĉi broŝuro la tradukon de siaj stenografiaj notoj pruvante, unu fojon plie, ke la esperantistoj de la tuta landaro, facile interkompreniĝis kaj diskutadis per la lingvo Esperanto. La laboro farita de nia fervora svisa kunbatalanto certe ne estos senutila por la ĉiama progresado de nia kara lingvo.

Nur en tiu verko oni trovas plene fidelan ripeton de ĉio, kio estis dirita en Bulonjo, kaj kvankam nur el tio konsistus la graveco de la verko, ĝi ja estus tre granda kaj ne bezonus plian laŭdon.

R. Duvos.

## Miksaĵoj

Du geinfanoj kreskis ĝis viriĝis la unua kaj viriniĝis la alia, estimante sin reciproke kaj vidigante al ĉiu, ilian feliĉecon, tiel senkulpan, kiel tiu kiun havis Adamo kaj Evo en la Paradizo.

Iatage virino, ŝajne perfekta, diris al ĉiu el ambaŭ: «Via farmaniero ne estas bona».

De tiam la geamikoj interparolas kaŝe, ili ruĝiĝas kiam ili publike interrigardas sin, kaj la protektantino diras al si mem: «Mi ilin moraligis».

*Esp. 10.072.*

Dos niños, varón y hembra, crecieron hasta hacerse hombre uno y mujer la otra, estimándose recíprocamente y ostentando su felicidad, tan inocente como la que tuvieron Adán y Eva en el Paraíso.

Un día una mujer, al parecer perfecta, dijo á cada uno de ellos: «Vuestra manera de obrar no es buena».

Desde entonces los amigos conversan á escondidas, se sonrojan cuando se miran en público, y la protectora se dice á sí misma: «Los he moralizado».

*Esp. 10.072.*

\* \* \*

Kiam oni parolas kun zurdulo oni rememorigas lin pri lia difekto. Kiam on parolas kun blindulo oni forgesigas lin pri la lia. Tial estas ĝenerale malsamaj la karakteroj de surduloj kaj blinduloj.

\* \* \*

Inter amikoj:

- Aŭskultu, mia bona; ĉu vi povus prunti al mi kvin durojn?
- Mi bedaŭras ĝin, sed mi havas neniom da mono sur mi.
- Kaj en via hejmo?
- Ciuĵ fartas bone, dankon.

EDUARDO CANO, *esperantigis.*

---

## NOVAJ ANOJ DE H. S. P. P. E.

El *Torquemada* (Palencia): 494, F.<sup>ino</sup> Felisa García; 495, Florencio García; 496, Aleksandro Manrique.



## Korespondada fako de "La Suno Hispana,,"

### FRAŬLINO:

F. G. Torquemada.

### SINJOROJ:

A. V., Pamplona.—A. S., Barcelona.—J. M. A., Valencia.—S. M. M. de P. P., Olot.—J. A. R., Sarandí del Gi (Uruguay).—D. T., Carcagente.

Mi ricevís viajn abonpagojn. Dankon.

Kore salutas Vin,

A. Ŝ. L.

---

## NIAJ VIZITANTOJ

N.º 34.—**Antaŭen Esperantistoj!!** Lartiga, 106, *Lima* (Peruo). Jarabono, 3 fr.

N.º 28.—**Espero Katolika.** A Sainte Radegonde prés *Tours* (*Indre et-Loire*, Francujo). Jarabono, Francujo, 4 fr.; alilando, 5 fr.

N.º 9-10.—**Espero Pacifista.** 26, rue de Chartres, *Neuilly-sur-Seine* (Francujo). Jarabono, 5 fr.

N.º 3.—**Esperantisten.** 37, Surbrunnsgatan. *Stockholm* (Svedujo), Jarabono, 3'50 frankoj.

N.º 10, 11 kaj 12.—**El Mundo Ilustrado.** Aguila, 60, *Habana*. Numero 10 ctoj-1, 2 kaj 3.

N.º 6.—**Germana Esperantisto.** Prinzentrasse, 95, *Berlin S.* (Germanujo). Jarabono 3 markoj.

N.º 1.—**Idealo.** Corso Calatafimi, 495, Palermo, *Italujo*. Jarabono, 3 fr.

N.º 3.—**Internacia Revuo Medicina.** 33, rue Lacépède. *Paris*. Jarabono, 12 fr.

N.º 4.—**Juna Esperantista.** 9, Avenue des Vollandes, *Genève* (Svisujo). Jarabono, 2 fr. 50.

N.º 10 II jaro.—**La Algieria Stelo.** 57, rue d'Isly, *Algèr* (Alĝerujo). Jarabono, 3 fr.

N.º 46.—**La Belga Sonorilo.** S-ro J. Coox, *Duffel*, (Belgujo). Jarabono, 4 fr.

N.º 120.—**La Revue de l'Esperanto,** 26, rue Wissoq, *Boulogne-sur-Mer* (Francujo). Prezo, 0'10 fr. ekzemplero.

N.º 6.—**La Esperanta Studento.** 16. Upper Westbourne Villas, Hove, Sussex-England. Jarabono, 2 fr.

N.º 142.—**Lingvo Internacia**. 33, rue Lacedépe. *Paris*. Jarabono, 5 fr. Kun literatura aldono 7 fr. 50.

N.º 123, 124, 125, 126, 127.—**Murcia**. Sociedad, 14, Murcia. Jarabono, 6 pesetoj.

N.º 145.—**Museo Exposición**. Medina, 37, *Alicante*. Jara bono, 5 pesetoj.

N.º 5.—**Revista de Menorca**. Ateneo científico. *Mahón*. Jarabono, 6 fr.

N.º 4.—**Ruslanda Esperantisto**. S. Petersburgo, Bolš. Podjačeskaja, 24 (Rusujo).

Unu numero 30 kopekojn.

N.º 4-5.—**Svisa Espero**. 6, vieux College, *Genève* (Svisujo) Jarabono, 2,50 frankoj.

N.º 18.—**The British Esperantist**. unuigita kun **The Esperantist**. 13, Arundel street, Strand. W. Q. *Londono*. Jarabono, 2 fr. Kun aldono literatura, 4 frankoj.

N.º 10.—**Tra la Mondo**. 15, Boulevard des deux Gares, *Mendon* (S. et O.) (Francujo) Jarabono, 8 fr.

N.º 6.—**Unua Paŝo**. San Stefano, 26, Sofia, (Bulgarujo). Jarabono, 3 fr.

---

Tipografia Moderna, á cargo de Miguel Gimeno, Avellanas, 11—Valencia.

---

## ANONCOJ

*S-ro Alfredo Quertant*, 170 strato Lauredean, Amiens (Francujo), deziras korespondi per ilustritaj poŝtkartoj.

*S-ro Fernando Lang*, Jahn-strasse 11, Heiddernheim dei Frankfurt á M. skribe diras al nia direktoro ke po ĉiu gazeto hispana (politika, humora, moda, presarta, k. t. p.), li sendos unu belan ilustritan karton de Frankfurto M. kaj po ĉiu katalogo aŭ almanako li sendos du kartoj.

---

## LA REVUO INTERNACIA MONATA LITERATURA GAZETO

kun la konstanta kunlaborado

\* \* \* DE DOKTORO L. L. ZAMENHOF \* \* \*

Tiu nova Revuo, tute redaktata en Esperanto, estos pure literatura, ĝi enhavos: novelojn, romanojn, poeziojn, komediojn, dramojn, seriozajn studiojn pri historio, geografio, statistiko, popolmorojn, k. c., kronikon tre mallongan pri la ĉefaj mondaj okazintaĵoj, bibliografio.

Ĉio politika, religia, aŭ kio povus naski disputojn estos malakceptata de la Redakcio.

D-ro L. L. Zamenhof *sola* povos verki artikolojn pri la *lingvo*.

La 1<sup>a</sup> numero aperos la 1<sup>an</sup> de Septembro 1906 okaze de la 2<sup>a</sup> Universala Kongreso de Esperanto.

KOSTO: ĉiu numero. . . . . 0 fr. 50

jara abono. . . . . 6 fr. »

En Hispanujo, oni povas jam de nun aboni ĉe:

La firmo *F. Espasa*, 579, calle de las Cortés, Barcelona.